# BULTENO

DE ESPERANTISTA KLUBO ĈE OSVĚTOVÁ BESEDA EN PRAHA 2.

No 12. Marto 1954 Aperas laŭbezone


Al ĉiuj infanoj, gepatroj kaj instruistoj.

Grava japana eldonejo deziras eldoni grandan verkon, kies aŭtoroj devas esti infanoj de la tuta mondo. Ĝi konscias, ke ĝia plano malfacile sukcesas sen helpo de esperantistoj kaj ĝi tial turnas sin al ni, ke ni instigu niajn infanojn al kunlaboro.
Ni citas parton el la alvoko de la eldonejo: "Kunlaboru kun ni por kolektiva verkado de INFANOJ EN LA MONDO, kiun ni projektas. Japanaj infanoj estis longe izolitaj de la tutmonda vivo. Tio estis granda malfeliĉo ne nur por ili, sed ankaŭ por la tuta mondo. Nun ili deziregas ekkoni la tutmondan vivon. Ili deziras kunsenti, kunlabori kaj kunvivi kun la gefrataro tutmonda por efektive fariĝi novaj indaj anoj de la homaro. Jen kial ni projektas tiun ĉi verkon, skribitan de infanoj. En nuna Japanio disvolviĝas notinda nova eduka agado per verkado de infanoj, disvolviĝo de liberaj skribesprimoj de infanoj pri propraj vivspertoj, sentoj, pensoj, observoj kaj propraj studoj. Tiu ĉi nova edukado montras mirindan sukceson disvolvigante la observo- kaj esprimo-kapablojn de la infanoj. El infanaj verketoj el ĉiuj partoj de Japanio ni povis kompili verkon "Japana lando kaj popolo de infanoj" kaj nun de ĝiaj legantoj kaj kunlaborantoj aŭdiĝas vortoj: Faru tiel same sur la tuta mondo per infanaj manoj. Kiel en ĉiu lando de la mondo la gefratoj infanoj lernas, ludas, laboras kaj pensas? Kiel gefratoj en la mondo, kiun ni povis nur malklare imagi, vivas ĉiutage en hejmo, en lernejo, en parko, en kamparo aŭ en aliaj realaj medioj? Niaj infanoj volas aliĝi al via vivo kaj aligi vin al nia vivo; alivorte kunvivi kaj kunlabori kun vi. Ni volas rapide doni tian legaĵon al japana infanaro. Ĝi certe profunde enradikiĝos en koroj de japanaj infanoj kaj kreos la belan mondon de infanoj."

Ĉiuj gepatroj kaj instruistoj ĉeĥoslovakaj petu siajn infanojn (lernantojn), ke ili verku longan aŭ mallongan rakonton pri sia vivo aŭ pri la vivo en sia familio aŭ en la ĉirkaŭaĵo, pri sia lernejo, pri siaj ludoj, amuzoj kaj festoj. Ili povas ankaŭ rakonti pri sia patrujo, pri regiono, urbo aŭ vilaĝo, en kiu ili loĝas, pri monto, lago aŭ rivero al ili plej bone konata, pri proksima kastelo, altega aŭ antikva ponto aŭ pri io ajn, kio kaptis ilian intereson. Ili ripetu per siaj vortoj rakonton el historio de sia loko aŭ de nia lando, ili povas diri, kion ili scias pri fama viro de ili ŝatata, kio kaŭzis plej fortan impreson en ilia ĝis nun mallonga vivo. Al siaj verkaĵoj ili povas aldoni siajn desegnaĵojn aŭ klaran fotografaĵon de interesa aŭ bela loko, monumento, arkitekturaĵo, ev. belan gravuraĵon.
Lasu la infanojn labori per propraj fortoj! Kredu, ke via helpo aŭ aranĝo ne utilos, sed eble male.

La originalan tekston kun via esperantlingva traduko sendu laŭeble plej rapide al Infana Fako de Heibon-sha, No 4, Yoaban-tyo, Kozimati, Tiyoda-ku, Tokio, Japanio. La eldonejo rekompencos ĉiun sendaĵon kaj al la aŭtoro (kaj lia instruisto) de ĉiu represita verkaĵo ĝi sendos la verkon post eldono.
Ni atendas nepran kunlaboron de ĉiuj niaj aktivuloj kaj grupoj. Se vi trovos necese korespondi kun ni pri tiu afero, nepre aldonu poŝtmarkon por respondo.

-oOo-

LA KUNVENOJ DE ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA okazas ĉiumerkrede je la 20a horo en Praha II., Ve Smečkách 26.

10.3.1954 : Josef Steklý: El Svisa Antologio.
17.3.1954 : Josef Vítek : Josefaj vesperoj de En en Hradec Králové.
25.3.1954 : K A N T O J  K A J  A M A  P O E Z I O (gvidas Št. Urban) solena vespero en granda salono! ANSTATAŬ LA MERKREDA VESPERO OKAZAS ĴAŬDe !!

P R O G R A M O :

1. Tři kanzonety J.Th.Helda pro zuby a kytaru .. Marta Ledková, Štěpán Urban
2. Eli Urbanová: Kiel princino trovis amon — la aŭtorino
3. Št.Urban - K.Kalocsay: Printempo
4. Št.Urban - L.Thevenin: Habanero — kantas Marta Ledková, akomp. E.Urbanová
5. Eli Urbanová: Poemoj el mia tirkesto — la aŭtorino
6. Št.Urban - H.Adamson: Ni ĝoju — kantas Marta Ledková
7. Juan en Esperantujo - fragmento el originala verko anonima.

\- - - - -

NE FORGESU: ĴAŬDE - ANSTATAŬ NIA MERKREDA KUTIMA VESPERO

31.3.1954 : A.Slanina - J.Vítek: Humoraĵoj el la historio de Esperanto-kolegio en Doksy 1946-1953 - kun filmo
Escepte la vespero en ĉeĥa lingvo - venigu viajn neesp.geamikojn!
7.4.1954 : Jarosl.Mařík: Literaturaj ĉapitroj.
14.4.1954 : Memorvespero honore al nia majstro Dro. L.L.Zamenhof okaze de la 37a datreveno de lia morto.
VIZITADU LA VESPEROJN DE NIA KLUBO!

-O-

K dnešnímu číslu našeho Bultena přikládáme složenku a prosíme naše členy, pokud ještě nezaplatili členský příspěvek na rok 1954 nebo minulý, aby tak učinili a tím podpořili naši práci. Členský příspěvek činí Kčs 24,-. Příslušníci rodin činných členů platí Kčs 8,-, studující a vojíni v činné službě Kčs 10,-. Všem, kteří včas zaplatili své příspěvky, vřele děkujeme!

-O-

SENDU VIAJN SALUTOJN kaj bondezirojn al IIa Kongreso de "Polska Zjednoczona Partia Robotnicza" (Pola Unuiĝinta Laborista Partio), kiu okazos 10/3 en Varsovio. - Pola movado esperantista, kiu konservis ankoraŭ sian landan asocion - la Asocion de Esperantistoj en Pollando, Marszalkowska 81/32 en Varsovio kun ĝia oficejo kaj kiu eldonas riĉenhavan Bultenon "Tra la mondo kaj literaturo", vere meritas tian subtenon de ĉiu esperantisto.

-O-

NOVA ESPERANTO-SLOVAKA VORTARO preparita de Martin Sýkora, aperis. Tamen ne ĉe ni, sed en Jugoslavio por la tiea slovaka minoritato.

-O-

INFANDESEGNOJ. Instruistoj sed eventuale ankaŭ gepatroj, instigu infanojn 7-14 jarajn fari desegnojn pri "Nia lando kaj popolo" kaj sendu la plej bonajn al Esperanto-Societo La Aglo c/o Gunhild Tistad, Hotellgatan 5, KARLSKOGA, Svedio. Sub la bildo skribu titolon, nomon de la desegninto, aĝon kaj landon. Dorsflanke skribu preslitere nomon kaj adreson. Oni disdonos valorajn premiojn. La desegnoj devas alveni al Karlskoga plej malfrue la 30an de junio.

-O-

Nova kurso por komencantoj okazas en Třebechovice pod Orebem. Partoprenas 7 personoj.

-O-

Al hodiaŭa numero ni almetas periodaĵon VERDA VOĈO DE DOKSY.

Proksima numero aperos komence de aprilo. Eldonkvanto de nuna numero 900.

Eldonas ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA,
adreso: Jaroslav Šustr, Praha I, Dlouhá 10.

V E R D A    V O Ĉ O

I N F O R M A   I N S T R U A   K A J   A M U Z A   B U L T E N O
D E   S O M E R A   E S P E R A N T O - K O L E G I O

---

REMEMOROJ KAJ PLANOJ

Somera kolegio de Esperanto en Doksy naskiĝis el modesta entuziasmo de kelkaj samideanoj, kiuj ekdecidis en la j. 1946 aranĝi somerajn kursojn de la lingvo en loko, kie ĉiujare pasigas miloj da niaj laboruloj feliĉajn tagojn de sia libertempo. Ankaŭ multe da adeptoj de niaj kursoj travivis sian forpermeson apud la lago de Mácha kaj najbara ĉirkaŭaĵo, plena de naturaj belaĵoj. Sed krom tiu naturbeleco de la ripozamuza medio ekzistis io alia, kio multajn ravis - nome la jam antaŭe fama societemo kaj sincera kamarademo de la esperantista popolo, kiu sciis krei belan atmosferon de interkompreno kaj reciproka amo.

Vere ne eblas per kelkaj alineoj sufiĉe priskribi ĉion, kio agrabligis al niaj esperantaj gastoj ties loĝadon en Doksy dum 7 jaroj de 1946 ĝis 1952. Certe tion faris zorgeme kaj bonfake gviditaj kursoj, amuz- kaj instruprelegoj, teatraĵoj, filmoj kaj koncertoj, banado en la lago kaj scenoriĉaj promenoj, sorĉistaj vesperprogramoj, gajaj dancvesperetoj sub la kastelo Bezděz, "veneciaj" noktoj sur lampionigitaj lagoŝipoj, bivakaj fajroj kun impresaj kantoj kaj humorscenetoj, aŭtobusekskursoj ktp. Sed ĉefe kontribuis la unika eco de niaj samideanoj, kiuj ofte sciis kvazaŭ spontane fariĝi kunkreantoj de la ĝuste plej belaj programeroj.

Organizintoj de SKED klopodadis transporti similajn kursaranĝojn alterne ankaŭ al aliaj lokoj (Svit, Poprad, Kost). Ĉiuj ĉi kursoj sendube ĝuis sukceson kaj siamaniere estis belaj kaj neforgeseblaj. Sed nenie aliloke oni povis satpetoli kaj satridi tiom kuraĝe bele kiom en Doksy. De tie ĉi disiradis regule gesamideanoj kun dolĉaj sentoj pri ĵusligitaj amikecoj, havante ofte larmoplenajn okulojn.

Ni foliumas tra nia korespondaĵ- kaj fotografaĵarkivo. Antaŭ niaj okuloj defiladas centoj da afablaj vizaĝoj kaj miloj da etaj historietoj. Ni rememoras la eksterlandajn gastojn, ni travivas vaporŝipveturon al Hřensko...

Revenos refoje la sunaj tagoj ĉe la lago kaj kun ili ĉio bela, kion vi primemoras. Post unujara paŭzo reviviĝos DOKSY per esperanta susurado de sablobordaj pinarboj, parkaj kverkoj kaj blankaj betuloj!

Intertempe nia esperantista tendaro diligente laboros por atingi altan celon, indikitan de nia Majstro. Eblecoj de porpaca laboro ricevis lastatempe vere vivigan injekton en formo de fondiĝo de "Mondpaca Esperantista Movado". Esperanto sin montris ĉiam taŭga por noblaj celoj. Oni apenaŭ konas pli altan celon ol povi defendi la Pacon. Tial ek al la pacesperanta movado kaj tiuaze ankaŭ ek al DOKSY 1954!

-O-

Šo.

SKRIBU AL MI LETERON

Mi rememoras vin senĉese,
matene, tage, noktomeze.

En mia koro amo ardas,
mi vian foton rerigardas;

la sorton mi demandas febre,
sed ĉio mutas mortfunebre.

Tamen mi havas vivesperon:
vi eble skribos amleteron ...

Eble vi, kara, ĝin jam sendas ...
Ho vigle, vigle, mi atendas ...!

K.Píč

## D O K S A "S U N O"

Antaŭ mi sur la tablo kuŝas folio de la "Verda voĉo", anoncanta, ke ĉi-jare denove okazos la someraj kursoj de Esperanto en Doksy. - Aĥ, Doksy! - mi enpensiĝas ...

Mi sentas min en varma ĉirkaŭpreno de suno, mi flaras la malsekan parfumon de la vespera lago, sed antaŭ ĉio aŭdiĝas en miaj oreloj la kara lingvo - Esperanto. Nur tiu, kiu partoprenis la somerajn kursojn, povas kompreni la koran amikecon, ligantan la lernantojn kun la instruistoj, la puran ĝojon akompanantan ĉiun komunan amuzon, la klopodon ellerni la verdan lingvon, sed antaŭ ĉio la homan fratecon, penetriĝintan profunden en la korojn. Esperanto estis ja kreita por helpi tiujn, kiuj helpon bezonas, ĝi ja naskiĝis el animo, plena de amo al homoj! Kaj ĉion ĉi ni plej bone konsciiĝas ĝuste en Doksy. Amaseto da homoj, venintaj el diversaj anguloj de nia ŝtato, renkontiĝas por pasigi du semajnojn en suna kunvivado kaj foriras por rememori dum la tuta jaro. Ĉu eblas forgesi la antaŭtagmezan instruadon, la junajn vizaĝojn, karesatajn de la suno, kies radioj penetras tra la malfermita fenestro? Aŭ la lagon, sur kies bordo en la plej beleta angulo flagras la verda flago kaj ĝia stelo brilas ..? La ekskursojn, la karnavalon kun juna rido, la melankolian sorĉon de la venecia nokto sur la lago, la kantojn, la absolutan feliĉon de tiuj du semajnoj?

Kaj tial mi, pensante pri Doksy, sentas antaŭ ĉio la sunon: sunon en la klasoj, sur la lago, en la koroj kaj okuloj - sunon, multe da suno, multe da homa varmo, kiun ni ĉiuj ja tiom bezonas ...

-O- Su.

## ESPERANTO - VIVANTA LINGVO DE LA PRAKTIKO

Pri ĉi tiu fakto skribas Enfried Malmgren, prezidanto de la Universala Esperanto-Asocio, en la antaŭparolo de la UEA-jarlibro por la jaro 1954 la jenon:

"Nia strebado jam de pluraj jaroj estas montri al la publiko, ke Esperanto ne plu estas iu projekto de internacia lingvo, sed kiel vivanta lingvo ja de jardekoj uzata de pluraj centmiloj da homoj, kiu nombro kreskas de jaro al jaro. Nia strebado estas montri, ke por la esperantistoj la internacia lingvo estas natura kaj plej konvena ilo por la interkompreniĝo, ke la esperantistoj malofte cerbumas en la studĉambro pri la teoriaj kvalitoj de la lingvo, sed ke uzas ĝin en la praktiko: en la legado de gazetoj kaj libroj, en korespondado kaj konversacio kun alinacianoj, en internaciaj kursoj, konferencoj kaj kongresoj."

-O-

## LETNÍ KOLEJ ESPERANTA

Esp. klub s Okresním výborem obránců míru v Doksech uspořádá ve dnech 25. července - 7. srpna t.r. v Doksech:
1/ tyto kursy: kurs základní (názornou esper.Ĉe-metodou) pro začátečníky, kurs pokračovací, konversační, řečnický a esperantský seminář (pro znalé esperanta a učitele esperanta) s přednáškami z esperantologie, esperantismu, o esper. hnutí a literatuře.
2/ společenské podniky: umělecká akademie, letní karneval, benátská noc na jezeře, odpolední výlet na hrad Bezděz, celodenní autokarový výlet aj. Odpoledne pobyt na rozsáhlé pláži jezera, koupání, vycházky do okolních lesů a j.
O ubytování, stravování, kolejném, jakož i o způsobu přihlášky a platby najdete informace v květnovém čísle VV popř. v prospektu, jenž vyjde později.

O slevu jízdného na drahách bude zažádáno. - Státní spořitelna v Doksech zavedla účelové spoření pro účastníky kursů LKED. Vyžádejte si příslušnou informaci! (Adresa dotazů: Letní kolej esperanta, Doksy u Máchova jezera, k rukám řed. Státní spořitelny s.V.Špůra.)

Praha, marto 1954 Eldonkvanto: 900 ekzempleroj